

Tri mondaj premieroj samtempe

La 7an de aprilo 2018 en la plenplena Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago estis premiere prezentita la nova opero de Ivan Acher *La suferado de princo Sternenhoch*, komponita laŭ la groteska romano de la ĉeĥa filozofo kaj verkisto Ladislav Klíma (1878-1928). La tuta opero estis kantita en Esperanto. La reĝisoro estas Michal Dočekal.

Miroslav Malovec, kiu tradukis la tekston al Esperanto, klarigis, ke Acher deziris, ke la opero estu kantata en Esperanto, por ke la spektantoj aŭskultu la melodion kaj ne klopodu deĉifri vortojn. Li sendadis unuopajn scenojn al la tradukanto, kiu esperantigis la deziratajn frazojn, kaj nur poste ili estis muzikigitaj. Ivan Acher jam komponis muzikon por kelkaj filmoj kaj teatraĵoj, sed *Sternenhoch* estis lia opera debuto. Poste la teatro ripetos la operon ĉiumonate en sia programo.

La ĉefaj esperantistoj povas fieri, ĉar temas ne pri unu, sed pri tri premieroj: unue, la monda premiero de nova opero; due, la monda premiero de nova opero en Esperanto; trie, la monda premiero de opero en Esperanto en la Nacia Teatro de Prago!

Legu pliajn informojn pri la opero:

<http://novajhoj.weebly.com/sternenhoch-opero.html>

Paŭlo Pavliček

